

fleksivo estas: „la patrino havas videblan plezuron el mia flata atento al *sia* (anst. *ŝia*) ideto” (62/15) (eble preseraro), kaj „ke li ne tro fidus al mi por rapide revenigi *sian* (anst. *lian*) filon” (135/-1).

Dufoje mi konstatis uzon de *-ope* anst. *po(e)* (47/4: kvindek kabanjoj dekoje aranĝitaj laŭ kvin vicoj; 130/-4: ses portistoj duope portantaj ...).

25/-1: „komencontaj” anst. „komenciĝontaj” aŭ „komencotaj”; 32/1: „veturante min” anst. „veturigante min”.

Kelkfoje mi preferus uzon de „*unu*”, ekz. 33/-15: „la planko estis proksimume (*unu*) metron super la tero”. Trouzo de *ec* en „en la (mal)proksimeco” (49/-8); misuzo de „*da*”: ekbrilo(j) *da* fulmo; procesio *da* kanotoj (185/1, 19; 193/13); „*imago* al si” (miksaĵo el *imago* kaj *prezenti al si*) (163/-6). Aliaj pleonasmoj: *hisi supren* (52/1), *ekvekiĝis* (74/-3), *anaro da indiĝenoj* (63/7), *granda -ego* (32/meze; 34/2). Kritikinda vortuzo: *ĵus* anst. *ĝuste* (24/4: mi ĵus respondis, antaŭ ol ...; Komp. kun „*ĝuste antaŭ ol ...*” 27/meze); *kondamninda* flugboato (anst. *damninda*) (58/-2); *ŝeloj* anst. *fruktoj* (129/meze); *senkonscie* anst. *nekonscie* (147/4); *veni* anst. *iri* (153/15; 196/11); *konstati* anst. *konscii* (196/11) („Bone mi konstatis ke iam mi devos reveni al Aŭstralio”); *tuta* anst. *plena* (silento) (195/15); *gapanta* anst. *oscedanta* vundo (169/18); *fiŝoj* anst. *moluskoj* aŭ *helikoj* aŭ *bestoj* (79/meze); strange impresas: *bela* parfumo (123/-13, 124/15) kaj *belodoro* (160/-18), kiel ankaŭ *bonega(j)* pejzaĝo kaj panoramo (49/-14, -16). „*Kontroli ĉu*” ŝajnas preferinda al „*kontroli ke*” (47/-1); „*kelkaj el liaj kanakoj*” al „*kelke de liaj kanakoj*” (134/5); „*elrigardante al la maro*,” al „*elrigardante la maron*” (122/12); *nefermita* al *neferma* (101/1); *Digul* al *Digoel* (nederlanda ortografio) (144/-16). „*Ni ne prokrastis serĉi la timegatan vizitanton*” ne celas signifi „*ni ne prokrastis la serĉon*”, sed „*ni ne prokrastis (la fuĝon) por (dume) serĉi ...*” (77/13); ĉi tiu konstruo ŝajnas ne akceptebla. Ne klara estas la funkcio de la vorto „*almenaŭ*” en „*Almenaŭ mi opiniis, ke mi estas sola, ĝis voĉo malantaŭ mi surprizis min*” (78/6). Nekredebla estas la jena aserto: „la akvo havis tiun perfekte kristalan klarecon kaŭzitan, kompreneble, de la granda enmikso de kloro” (86/-13). Nerekomendinda vortordo en jenaj kazoj: „*Mi ankoraŭ ne tion faris, ...*” (81/meze) kaj „*Aitape, kiu nun estis la plej proksima batalkampoj al Madang*” (anst. „... la batalkampoj plej proksima al Madang”) (31/-7). Pri evidentaj preseraroj mi ne parolu.

La supra listo de kritikoj ŝajnas longa, sed ĝi ne estas, kaj ĝenerale temas pri negravaj kritikindaĵoj. Ni strebu al perfekte, kaj tial mi menciis ilin. Mi kore rekomendas ĉi tiun libron, kiu certe estos bonevena legaĵo ankaŭ por niaj junaj samideanoj. Profesoro *Privat* iam publikigis ĉe Literatura Mondo tre legindan libron pri „*Interpopola Konduto*”. Samideano *Linton* sub formo de rakonto pri siaj personaj travivaĵoj donas sian tre legindan kaj interesan instruon pri interrasa konduto. Dankon al li pro tio, kaj al la eldonejo. — W. P. R.

914.89

„**Kie abundo estas malofta kaj manko pli malofta - DANIO**”

Sub tiu titolo la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj en Danlando ĵus eldonis 32-paĝan libreton pri Danlando.

La tekston verkis Johannes Lindskov Hansen, kaj riĉe ilustrita la broŝuro rakontas pri la lando kaj ĝia ĉefurbo, pri la dana popolo, ilia vivo kaj okupo ktp. Mallonge: ĝi estas bonega enkondukilo en danajn aferojn, speciale redaktita por eksterlandanoj.

Ĉar estas la unua fojo, ke la Dana Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj eldonas *oficialan* publikaĵon en la internacia lingvo, estas dezirinde, ke la Esperanta publiko montras sian intereson por ĝi - simple ĝin havigante al si.

La belega libreto estas *senpage* havebla nur ĉe la danaj diplomaciaj reprezentitoj en eksterlando, t.e. ĉe la ambasadejoj de la Dana Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj, tial oni sin turnu al la plej proksima dana ambasadejo por ĝin akiri.

Por C.D.E.L.

Leo Sjøgaard-Hansen

312(491.1,1703”(083.41) = 396(048.6) = 20 = 089.2

**MANNTALID 1703** (Popolnombrado de 1703), publikigaĵo de la Statistika Oficejo de Islando, Reykjavík, 1960. 60 paĝoj 24.3 × 15.7 cm<sup>2</sup>; prezo: 20,00 kronoj islandaj.

27 paĝoj havas islandan tekston kun multaj tabeloj; sekvas angla resumo kvarpaĝa kaj esperanta resumo dupaĝa + duona paĝo kun esperanta traduko de preskaŭ 40 islandaj gvidvortoj en la tabelo. La paĝojn 34-59 okupas tabeloj. — W. P. R.

{141,319.8:840 Sartre} (042) = 089.2 = 40

141.319.8 : 84 Sartre = 1 = 4

Colette L lech - Walter: **Ekzistencialistaj Herooj en la Literatura Verkaro de J. P. Sartre**. 71 p., en Esperanto kaj franca lingvo, kun antaŭparolo de Prof. G. C a n u t o, kiu prave diras, ke la aŭtorino „sciis doni klaran ideon sufiĉan de la ĉefaj punktoj de la penso de la prezentita aŭtoro kaj lasi en la aŭskultintoj (kaj legintoj) la emon ekscii ion pli, eble per rekta legado de la cititaj verkoj.” Mi legis la verketon kun multe da plezuro kaj ankaŭ kun profito, kaj volonte rekomendas ĝin al aliaj, kiuj — kiel mi — la verkojn de S a r t r e apenaŭ aŭ tute ne konas.

Lingve la esperanta teksto — pri la franca mi nenion arogas — ne estas tute senmakula. Sur p. 18 prezentigas frape la problemoj de la kazo post „*t.e.*”. Miaopinie „*t.e.*” ne influu la kazon. La frazoparto tekstas: „S a r t r e ... kreis tiel, novan manieron: *t.e.*: la filozofia literaturo.” Fakte en ĉi tiu frazo „*t.e.*” estas eĉ tute superflua; en la franca teksto io simila ne troviĝas. La nominativo post ĝi miaopinie estas malĝusta.

La interpunkciado ankaŭ estas stranga. Troviĝas multege da superfluaj komoj, ekz. tiu post *tiel* en la ĉi-supre citita frazoparto.

p. 22/-5: Leviĝas la demando: Kiu estas tiu *oni* kiu kreis nin? Ĉi tie pasiva konstruo (kiel en la franca) estas necesa. p. 22/-1: La vorto *verkisto* per la lingvuzo ricevis malvastan signifon; ĉu oni ankoraŭ povas uzi ĝin kun tre vasta senco, por kiu ajn kreanto de kia ajn verko arta aŭ alia?

p. 24/-11: „*tiom longe* ili havos..., *tiam* ili forgesos...” estu: „*tiom longe, kiom* (aŭ: *tiel longe, kiel*, aŭ simple: *dum*) ili havos..., ili forgesos...”

Pp. 28/-3, 36/-8, 46/-4: „*Jen li estas ...ante ...*”; se oni uzas la adverbbon ... *ante*, do estu komo post „*estas*”; sen komo oni uzu adjektivan particon, kiu estas ĝusta ankaŭ kun komo.

P. 40/-4: *respeguligataj* estu *respegulataj* pp. 20, 44, 46: „*la plej grava parto de (el) la homoj*” — kial ne simple kaj ĝuste: „*la pli multaj homoj*”? P. 50: „*ni agadas senĉese en la saman direkton*”; evidente ĉi tiu akuzativo estas eraro. Ĝenerale mi rimarkigu ke estas sufiĉe multaj eraroj pri tempoj, participoj, kazo kaj refleksivo. Ĉi tiuj ne tre gravaj malperfektaĵoj igu neniun decidi ne legi ĉi tiun interesan kaj ankaŭ aktualan broŝuron.

— W. P. R.

8-14=089.2

812-18 BOU

Marjorie B o u l t o n: **EROJ kaj aliaj poemoj**. Originala poemaro kun du portretoj de la aŭtorino. Eldonaĵo n-ro 15a en la serio Beletro de Stafeto. 368 p., 16 × 22 cm<sup>2</sup>. Prezo \$ 2,40 aŭ egalvaloro (34 steloj), plus afranko.

La *EROJ: Tero* (dediĉita al Tibor S e k e l j), *Libero* (dediĉita al d-ro Ivo L a p e n n a), *Vero* (dediĉita al Reto R o s s e t t i), *Mistero* (dediĉita „al la tri inspirantoj, kiuj ofte sugestis al mi eblecojn, ke la homaro ja daŭre evoluas”), kune ampleksas la paĝojn 17-59. Laŭ sia tendenco ili estas ege simpatiaj: la esprimo elkorfunda de aŭtorino por kiu amo kaj libero estas iom pli ol nuraj vortoj. Tamen, kiel poezio ĉi tiuj kvar pli longaj poemoj ŝajnas al mi ne tiel sukcesaj kiel multaj aliaj ŝiaj poemoj, ĉar en pli ol unu loko la versoj impresas iom banale - ekz. sur p. 18: „Ni vivas en timema tedo; / infanan miron frue perdas / kvankam ni loĝas sur planedo; / printempo ĉiujare verdas.” / -, aŭ iom artefarite. Sed ankaŭ vere belajn perlojn oni trovas en ili.

En la parto titolita „*Provizore*” ni trovas 16 poemojn en terzinoj, kies unuaj dek pentras nian vivovoĵon de naskiĝo ĝis morto, la ceteraj temas pri la ĝojindaĵoj de la vivo, kaj ĝia mizero, pri nia nescio kaj nia kredo, pri la neceso de amo al ĉiu homfrato kaj respekto al vivo.

La parto „*Sur nia Sanga Tero*”, kun 14 tre ŝatindaj poemoj, ampleksas la paĝojn 75-98. Jen la komenco de unu el ili, „*La ĵurnalo*”:

Jen la ĵurnalo. Sub pezaj radoj  
la pinarbaroj iĝis mensogadoj.  
En pinarbaroj bonodore ventas;  
ĵurnalo ĉe la tablo nun prezentas  
politikistojn famajn, kun programoj,  
kaj ankaŭ vendemulojn, kun reklamoj.  
Ili tre sinaprobe nin konsilas,  
kaj laŭ la stilo ili tre similas.”

La paĝoj 99-112 estas dediĉitaj al la „*Kvarpieda Konsolanto*”, la siama kato de la aŭtorino. „*Folioj de Ora Branĉo*” estas la komuna titolo de la poemoj sur p. 113-193, poemoj pri la „malfeliĉa” amo de la poetino, daŭrigo de tiuj kiujn ni konas el „*Kontralte*” kaj apartenantaj al la plej senperaj en ĉi tiu volumo. Ĉi tiun parton finas 6 „*Adiaŭaj Sonetoj*”. Sekvas sur p. 195-233 „*Amkantoj laŭ minoraj gamoj*”, i.a. kun 10 „*Platonaj Sonetoj al Julio Baghy*”. La sekva parto (p. 235-312) titoliĝas: „*Momento kaj Meditoj*”. El la multaj belaj miniaturoj mi citu nur la jenan:

*Papilio sur Ŝipo*

Radiotelegrafiisto morsas.

Perdita papilio kontraŭ vitron

sin batas, batas batas .....

mesaĝas kun morseca klaro

dum ni ekskursas:

„Mi mortas sola sur senflora maro.”

La lasta parto (p. 313-349), „*Bildoj el Mia Albumo*” portretas verse 25 gesamideanojn.

Al kiu plaĉis *Kontralte*, al tiu certe plaĉos ankaŭ *Eroj*, poemoj ĝenerale altkvalitaj, de simpatia, homama poetino kun arda temperamento.

Kvankam preseraroj ne estas tre abundaj, ili ĝenas pli en poezio ol en prozo, ĉar ofte oni ne certas pri tio, ĉu temas pri eraro aŭ ne. Jen kelkaj sugestaj demandoj: p. 35/-7 *dironta*; p. 43/2a strofo: ĉu mankas verso?; 44/7 *trovante*; 48/-7 *kreanta* aŭ *por krei*? 70/13 kaj 356/9 „*Freude, schönes Götterfunken*” - evidente ne preseraro, sed miscito! 72/-8 „*en mondo, kiun*”; 73/-1 *nekonata*; 84/14 *plenvenkinte*; 85/5 iomete dusenca estas „*fiera strateg*’”, ĉi tie supozeble interpretenda kiel *strat'eg*'; 101/-9 *alvokon*; 107/3 *per* (anst. *sur*); 119/1 *kunrilata*; 125/7 *miajn jarojn*; 138/5 *klara*; 138/-7 *kia* (anst. *kiel*); 142/-2 komo post *virino*; p. 143: kratago kaj lonicerero ne floras samtempe; 164/6 *banalo*; 165/6 *longega*; 175/2 *disvolviĝis*; 206/9 *koloro*; 214/-4 *sed*; 230/15 *flo-ranta*; 254/-1 *homaro*; 286/-2 kio estas „*folioj urĝaj*”? 292/-1 *sian*;